# Facilaj Legaĵoj de Esperanto

## 100 HUMORAĴOJ

世界语简易读物

# 幽默100则

北京大学第一分校
用章

知识出版社

Eldonejo SCIO

世界语简易读物

# 幽默100则

# 100 Humoraĵoj

李威伦 编

## 内 容 提 要

本书是从各国出版的世界语书刊中选出的世界语幽默短文、笑话、轶事、寓言等100则。内容短小精悍，生动有趣，文字简明易懂。对各篇文中的生字和合成字等，都分别加了注释。

本书可供世界语协会会员、世界语学习班和大专院校世界语选修课师生、世界语自学者、语言研究者阅读。


世 界 语 简 易 读 物

幽 默 100 则

100 Humorajoj

李 威 伦 编

知 识 出 版 社 出 版

（北京安定门外外馆东街甲1号）

新华书店北京发行所发行

河北涿县中学印刷厂印刷

开本787×1092 1/32印张1 1/16字数34千字

1983年4月第1版 1983 4月第1次印刷

印数：1—10.000册

书号：9214.21　　定价：0.24元

# Enhavo 目录


1. Netaŭga respondo . . . . . . . . . . . . . . . . 1
2. Mi jam endormiĝis . . . . . . . . . . . . . . . 1
3. Ne plu manĝaĵon . . . . . . . . . . . . . . . . 1
4. Ĉapelo de la urbestro . . . . . . . . . . . . . 1
5. Latunaĵoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1
6. Pesimismo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2
7. Lia matenmanĝo . . . . . . . . . . . . . . . . 2
8. Trafa demando . . . . . . . . . . . . . . . . . 2
9. Geometrio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2
10. Vi ludas pianon . . . . . . . . . . . . . . . 2
11. Ne mensogu! . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
12. Kies pilko? . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
13. Mi ne scias . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
14. Vojmontrilo . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
15. Tro frua danko . . . . . . . . . . . . . . . . 3
16. La oksigeno . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
17. En la ekzameno . . . . . . . . . . . . . . . . 4
18. En la kafo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
19. Mandiveno . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
20. Kio entenas lakton? . . . . . . . . . . . . . 4
21. Alfabeto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
22. Fumo kaj vivo . . . . . . . . . . . . . . . . 5

23. Diferenco inter la fulmo kaj la elektro . . . . . . . . . . 5
24. Apetito . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
25. 100 gradoj . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
26. Foririnte . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
27. Certa pruvo . . . . . . . . . . . . . . . . 6
28. Neniu helpis min . . . . . . . . . . . . . . 6
29. La unua fumado . . . . . . . . . . . . . . 6
30. Historio . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
31. Leopardo . . . . . . . . . . . . . . . . . 7
32. Geografio . . . . . . . . . . . . . . . . . 7
33. Kuracista konsilo . . . . . . . . . . . . . . 7
34. Profesio . . . . . . . . . . . . . . . . . 7
35. Li havas malbonajn okulojn . . . . . . . . . . . 7
36. En bestĝardeno . . . . . . . . . . . . . . . 8
37. Fervoja horaro . . . . . . . . . . . . . . . 8
38. La avo ronkas . . . . . . . . . . . . . . . 8
39. La pli granda malbono . . . . . . . . . . . . . 8
40. Memoro . . . . . . . . . . . . . . . . . 9
41. La fulmotondro . . . . . . . . . . . . . . . 9
42. Dupieda leono . . . . . . . . . . . . . . . 9
43. La bona koro . . . . . . . . . . . . . . . 9
44. La kanario . . . . . . . . . . . . . . . . 10
45. Enbuŝaĵo . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
46. Asekuro . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
47. Antaŭ la akvofalo . . . . . . . . . . . . . . 10
48. La ĉefverko de pentristo . . . . . . . . . . . . 11
49. Kiam la knabo manĝis ovon? . . . . . . . . . . . 11

此为试读，需要完整PDF请访问：www.ertongbook.com

50. Bona filo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
51. Kiom estas la mondrekordo? . . . . . . . . . . . 11
52. En muzeo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
53. Kampara vivo . . . . . . . . . . . . . . . . . 12
54. La hundo kaj la horo . . . . . . . . . . . . . 12
55. En aŭtobuso . . . . . . . . . . . . . . . . . 12
56. Tunelo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 12
57. Du minutoj . . . . . . . . . . . . . . . . . 13
58. La avo, la patro kaj la nepo . . . . . . . . . . 13
59. Lingva leciono . . . . . . . . . . . . . . . . 13
60. La patro ofendiĝis . . . . . . . . . . . . . . 13
61. Kie estas Vezuvo? . . . . . . . . . . . . . . 14
62. Petro povas ludi kun mi . . . . . . . . . . . . 14
63. Estus domaĝe! . . . . . . . . . . . . . . . . 14
64. Saĝa konsilo . . . . . . . . . . . . . . . . . 15
65. En restoracio . . . . . . . . . . . . . . . . 15
66. Kiu estas pli malsaĝa? . . . . . . . . . . . . . 15
67. La sekreto de lia sukceso . . . . . . . . . . . . 15
68. Skriba laborajo . . . . . . . . . . . . . . . . 16
69. Kiel vidas la homo? . . . . . . . . . . . . . . 16
70. Li ekkonigis sin . . . . . . . . . . . . . . . 16
71. La sonĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
72. Ekzameno de fiziko . . . . . . . . . . . . . . 17
73. Strigo transloĝiĝas . . . . . . . . . . . . . . 17
74. Najbara konsilo . . . . . . . . . . . . . . . 17
75. Jana rigardas futbalmatĉon . . . . . . . . . . . 18
76. Biologio . . . . . . . . . . . . . . . . . . 18

77. Oni parolas ĉiujn lingvojn . . . . . . . . . . . . 18
78. Mia patro ne estas hejme . . . . . . . . . . 19
79. Elĵogo el la domo . . . . . . . . . . . . . . 19
80. Senfrukta arbo . . . . . . . . . . . . . . 19
81. Nia lasta futbalmatĉo . . . . . . . . . . . . . 20
82. Patro kaj filoj . . . . . . . . . . . . . . 20
83. La kuracilo . . . . . . . . . . . . . . . . 20
84. La vulpo kaj la vinbero . . . . . . . . . . . . 21
85. Inter bopatroj . . . . . . . . . . . . . . . 21
86. En la vagonaro . . . . . . . . . . . . . . 21
87. Ezopo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 22
88. La papago . . . . . . . . . . . . . . . . . 22
89. Niatempa amo . . . . . . . . . . . . . . . 23
90. Ĉu la negroj havas nigrajn larmojn? . . . . . . . . . 23
91. Malfeliĉa komercisto . . . . . . . . . . . . 24
92. *Li ne povis manĝi la supon* . . . . . . . . . . . 24
93. Kiu kreis la mondon? . . . . . . . . . . . . 25
94. Esperanton parolanta kanario . . . . . . . . . . 25
95. Dudek azenoj . . . . . . . . . . . . . . . 26
96. La spikoj . . . . . . . . . . . . . . . . . 26
97. La fosiloj . . . . . . . . . . . . . . . . 26
98 Kial la ovo estas sala? . . . . . . . . . . . . 27
99. "Vi, mi, ŝi" . . . . . . . . . . . . . . . . 27
100. La bonŝanco de servistino . . . . . . . . . . . 28

## NETAŬGA[1] RESPONDO

— Kiu li estas?
— Li estas filo de siaj gepatroj.

## MI JAM ENDORMIĜIS[2]

**Patrino**: Petro, ĉu vi enlitiĝis?
**Filo**: Jes, mi jam endormiĝis.

## NE PLU MANĜAĴON

— Sinjoro, via hundo manĝis unu el miaj kokinoj.
— Dankon, bona homo, pro via averto. Hodiaŭ vespere mi ne donos al ĝi manĝaĵon.

## ĈAPELO DE LA URBESTRO

**Urbestro**: Mian ĉapelon.
**Servisto**: Jen via ĉapelo.
**Urbestro**: Tio ne estas mia.
**Servisto**: Pardonu, sinjoro urbestro, mi brosis ĝin iomete.

## LATUNAĴOJ

— Ĉu vi poluris ĉiujn latunaĵojn?
— Jes. Restas nur la brak- kaj orelringoj de via sinjorina moŝto[3].

1. ne-taŭg-a 不适当的，无用的。
2. en-dorm-iĝ-i 入睡，睡着。
3. brak-ringo 手镯；orel-ringo 耳环；  via sinjorina moŝto 夫人的尊称。

## PESIMISMO

— Kara amiko, kial malesperi? La suno ja brilas super la nuboj.
— Jes, kaj sub la maro estas firma grundo, sed tio nenion helpas[4] kiam oni falas en la maron.

## LIA MATENMANĜO

Unu drinkemulo[5] demandis la alian:
— Ĉu vi hodiaŭ matenmanĝis?
— Ne, eĉ ne unu guteton.

## TRAFA DEMANDO

**Patrino**: Ne metu la dikan fingron[6] en la buŝon!
**Filo**: Kiun fingron do, panjo[7]?

## GEOMETRIO

— Kiel vi povas pruvi, ke tiuj ĉi du trianguloj estas similaj?
— Sed mi nenion deziras pruvi. Mi kredas, se vi diras.

## VI LUDAS PIANON[8]

— Ĉu vi komprenas muzikon?
— Jes, iomete.
— Ĉu vi scias, kion mi momente ludas?
— Ho jes. Vi ludas. . . pianon!

---

4. Tio nenion helpas 这无济于事。
5. drink-em-ul-o 酒鬼。
6. dika fingro 大拇指。
7. pa-nj-o 妈妈，读 pan-jo，后缀 -nj- 表示对女性的爱称。
8. ludi pianon 弹钢琴。

## NE MENSOGU!

**Patro:** Ne mensogu! Kiam mi estis infano, neniam mi mensogis.
**Filo:** Kiam do vi komencis mensogi, paĉjo[9]?

## KIES PILKO?

— Ĉu estas via pilko, Karlo?
— Kiom da fenestroj ĝi rompis?
— Neniom.
— Jes, ĝi estas mia.

## MI NE SCIAS

— Kiuj estas la plej oftaj vortoj en la lernejo?
— Mi ne scias, sinjoro instruisto.
— Ĝuste. Vi bone divenis.

## VOJMONTRILO[10]

Vojmontrilo havas sekvantan surskribon[11]:
"Ĉi tiu vojeto kondukas al B. sed kiu ne scias legi, iru sur la granda vojo."

## TRO FRUA DANKO

— Ĉu vi tralegis[12] mian verkon?
— Jes, eĉ dufoje.
— Dankon! Ĉu efektive?
— Vere. Je la unua fojo nenion mi komprenis.

---

9. pa-ĉj-o 爸爸，读 paĉ-jo，后缀 -ĉj- 表示对男性的爱称。
10. voj-montr-il-o 路标。
11. sur-skrib-o 指写在路标上的文字。
12. tra-leg-i 通读。

## LA OKSIGENO

— La oksigeno estas necesega por la vivo. Oni eltrovis[13] ĝin en la jaro 1703.

— Kaj kiel oni vivis antaŭe?

## EN LA EKZAMENO

**Instruisto:** Ŝajnas al mi, ke la demando estas tro malfacila.

**Lernanto:** Ne, sinjoro instruisto, ne la demando, sed la respondo.

## EN LA KAFO

— Diru al mi frazon, en kiu enestas[14] "sukero"!

— "Miaj gepatroj ofte trinkas nigran kafon".

— Sed kie estas "sukero"?

— En la kafo.

## MANDIVENO

**Mandivenistino[15]:** Ho ve[16], kion mi vidas: oni mortpikos[17], distranĉos, kuiros kaj manĝos vin!

**Kliento:** Momenton, mi forgesis demeti miajn gantojn.

## KIO ENTENAS LAKTON?

— Ĉu vi konas kvin aĵojn, kiuj entenas lakton?

— La fromaĝo, la butero. . .

— Jes, kaj. . .?

— Kaj unu kaprino kaj du bovinoj.

---

13. el-trov-i 发现。
14. en-est-i 含有。
15. man-diven-ist-in-o 看手相的女人。
16. ho ve 哎呀，糟糕。
17. mort-pik-i 刺死。



此为试读，需要完整PDF请访问：www.ertongbook.com

## ALFABETO

— Kiu estas la unua litero de la alfabeto?
— La unua litero de la alfabeto estas "a".
— Bone. Kaj kio sekvas poste?
— La ceteraj literoj.

## FUMO KAJ VIVO

— Tro ofte vi fumas!
— Kial gravas?[18]
— La fumado mallongigas la vivon.
— Bagatelojn vi parolas[19]. La antikvaj grekoj ne fumis, sed ĉiuj mortis senescepte.

## DIFERENCO INTER LA FULMO KAJ LA ELEKTRO

— Diru al mi la diferencon inter la fulmo kaj la elektro!
— La fulmo estas senkosta, por elektro oni devas pagi.

## APETITO

— Kial vi petas almozojn[20]?
— Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro.
— Kial do vi ne laboras?
— Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

## 100 GRADOJ

La instruisto klarigas la funkciadon de la termometro:
— Je 100 gradoj la akvo ekbolas.
Petro demandas:
— Kaj kiel la akvo ekscias, ke estas 100 gradoj?

---

18. Kial gravas? 有什么要紧?
19. paroli bagatelojn 说的是小事。
20. peti almozojn 行乞，要饭。

## FORIRINTE

**Gasto:** Ĉu vi havus la afablecon min anonci al fraŭlino Boll?
**Servistino:** Bedaŭrinte ŝi foriris, sinjoro!
**Gasto:** Kiam ŝi revenos?
**Servistino:** Atendu momenton, mi demandos ŝin.

## CERTA PRUVO

**Sinjorino:** Minna, je kio vi rimarkas, ke kokino estas maljuna?
**Servistino:** Je la dentoj, sinjorino!
**Sinjorino:** Kiel absurde! Kokinoj ja ne havas dentojn!
**Servistino:** Sed mi!

## NENIU HELPIS MIN

**Instruisto:** Kiu helpis al vi desegni ĉi tiun mapon?
**Lernanto:** Neniu!
**Instruisto:** Ĉu via frato ne helpis?
**Lernanto:** Ne. Li sola desegnis la tutan landkarton.

## LA UNUA FUMADO

— Kiam vi fumis la unuan fojon, eble vi sentis kapdoloron[21].
— Ne! Doloris al mi la tuta korpo.
— Kia strangaĵo!
— Pro tio, ke mi ricevis teruran vergbatadon[22] de mia patro.

## HISTORIO

Dum la ekzameno de historio la instruisto demandas:
— Ĉu vi povas diri al mi ion pri la famuloj el la XVI-a jarcento?
— Nature, sinjoro instruisto, ili jam ĉiuj mortis.

---

21. kap-dolor-o 头疼。
22. verg-bat-ad-o 鞭打。

## LEOPARDO

— Sinjoro profesoro, ĉu estas vere, ke la leopardo ne atakas la homojn, se ili portas branĉon de palmo en la mano?

— Dependas de tio, kiom rapide oni ĝin portas.

## GEOGRAFIO

**Instruisto**: Kiu malkovris Amerikon?
**Lernanto**: (rigardas stulte.)
**Instruisto**: Nu, Kristoforo Kolumbo.
**Lernanto**: (iras al sia loko.)
**Instruisto**: Kial vi iras al via loko?
**Lernanto**: Mi pensis, ke vi alvokis alian lernanton.

## KURACISTA KONSILO

— Vi nepre manĝu fruktojn, se vi volas resti sana. Sed ne senŝeligu[23] la fruktojn. Ĉar en la ŝelo troviĝas la vitaminoj kaj aliaj necesaj faktoroj[24]. . . Kiujn fruktojn vi preferas?

— Kokosojn.

## PROFESIO

— Kion vi intencas fari, se vi estos granda?

— Unue mi fariĝos kuracisto por kontentigi mian patron. Poste mi fariĝos inĝeniero por kontentigi mian patrinon. Fine mi fariĝos maristo por kontentigi min mem.

## LI HAVAS MALBONAJN OKULOJN

Vojaĝanto rigardas tra fenestro de aviadilo:

— Kiel malgrandaj estas la homoj, similaj al formikoj.

— Sed tiuj ja estas formikoj, sinjoro! Ni ankoraŭ ne forflugis[25], ni estas sur la tero.

---

23. sen-ŝel-ig-i 削皮，去壳。
24. faktor-o 因素，文中指“营养素”。
25. for-flug-i 飞走。

## EN BESTĜARDENO[26]

Du amikoj vizitis bestĝardenon. Unu montris leonon kaj demandis:
— Kion dirus ĉi tiu tigro se li povus paroli?
Lia amiko respondis:
— Antaŭ ĉio[27] li dirus, ke li ne estas tigro, sed leono.

## FERVOJA[28] HORARO

Provinca stacidomo[29]. La trajno malfruas.
— Terure! La trajno malfruas pli ol 20 minutojn. Mi ne komprenas, kial ekzistas la horaroj!?
— Sed se ne ekzistus horaroj, kiel vi scius, ke la trajnoj malfruas?

## LA AVO RONKAS

La avo dormas en brakseĝo kaj ronkas.
La nepo iras al li kaj turnadas la butonojn sur lia jako.
— Kion vi faras? — demandas la patrino.
— Mi serĉas alian stacion[30], — li respondas.

## LA PLI GRANDA MALBONO

**Sinjoro** (al amiko): Se via infano vespere tiom krias, tiam do via edzino endormigu[31] ĝin per kantado.

**Amiko**: Ni provis ĝin, sed la najbaroj petis nin, ke ni preferu la infanan kriadon.

---

26. best-ĝardeno 动物园。
27. antaŭ ĉio 首先。
28. fer-vojo 铁路。
29. staci-domo 车站。
30. stacio 台，站，文中指“电台”。
31. en-dorm-ig-i 使…入睡。

## MEMORO

— Mi forgesas nenion, kion mi iam enmemorigis[32].
— Ĉu vere? Kaj ĉu vi ankoraŭ memoras la 50 markojn[33], kiujn mi pruntedonis[34] al vi?
— Ne, tiujn mi ja ne konservis en mia memoro, sed en mia poŝo.

## LA FULMOTONDRO[35]

Dumnokte forta fulmotondro ekestas[36]. La malgranda Manjo forlasas sian liton kaj iras en la proksiman ĉambron al la lito de l' patrino.

**Patrino**: Kion vi deziras?

**Manjo**: En vian liton, ĉar en la mia tondras.

## DUPIEDA LEONO

Juna kaj tre bela dresistino[37] de leonoj permesis al leono preni pecon da sukero el ŝia buŝo.
— Tion povas ankaŭ mi fari, — diris unu rigardanto.
— Kio, vi malforta junulo?
— Jes, egale bone kiel la leono.

## LA BONA KORO

**Juĝisto** (al akuzito[38]): Mi demandas vin, kiun kaŭzon vi havis por bategi kvin policistojn?

**Akuzito** (fortega viro): Mia bona koro estas la kaŭzo. Se mi estus batinta nur unu policiston, li certe estus mortinta.

---

32. en-memor-ig-i 记住。
33. marko 马克（德国货币）。
34. prunte-don-i 借给。
35. fulmo-tondro 雷电。
36. ek-est-i 发生。
37. dres-ist-in-o 驯兽女郎。
38. akuz-it-o 被告。

## LA KANARIO

**Knabeto** (portanta katinon): Bonan tagon, sinjorino. Mi alportas ĉi tien vian kanarion forflugintan kaj petas la premion por la realportanto[39].

**Sinjorino**: Vi ja ne alportas mian birdeton, sed katinon.

**Knabeto**: Via kanario estas en ĝi!

## ENBUŜAĴO[40]

— Kial oni metas la enbuŝaĵon al la ĉevalo?

— Por igi ĝin obeema.

— Ne.

— Por ĝin gvidi.

— Ne.

— Kial do?

— Ĉar ĝi ne povas mem ĝin meti al si.

## ASEKURO

— Ĉu vi ne volas asekuri vin kontraŭ ŝtelo?

— Kial? Mi ŝuldas al mia mastrino jam de ses monatoj la lupagon[41]. Ŝi jam atentas, ke neniu forportu ion el mia posedaĵo.

## ANTAŬ LA AKVOFALO[42]

— Tiu ĉi, ĝesinjoroj, — diris la gvidisto al vojaĝsocieto[43] — estas la plej granda akvofalo en la Alpoj. Mi petas la sinjorinojn interrompi[44] momente la konversacion, por ke ni povu aŭdi la tondran bruegon de la faleganta[45] akvo.

---

39. re-al-port-ant-o 指重新把鸟找回来的人。
40. en-buŝ-aj-o 马衔。
41. lu-pag-o 租金。
42. akvo-falo 瀑布。
43. vojaĝ-societ-o 旅行团。
44. inter-romp-i 中断。
45. fal-eg-ant-a 倾泻而下的。



此为试读，需要完整PDF请访问：www.ertongbook.com